

## La turnileto de Pater Anianus

En Hungario la aŭtuno estas milda. Sed en la septembro de la jaro 1829 la vetero estis ankoraŭ pli varma kaj pli seka ol kutime. En la urbo Győr, sur la monteto Káptalan, en la ĝardeno de la episkopa kastelo fieras la arboj ankoraŭ en flava kaj ruĝa koloroj, sed la folioj jam pendas malsupren.

La strateton kondukantan el la urbo kovras densa polvo. La lernantoj rapidantaj en la lernejon, - kiel se ili havus tian plaĉon, - piedbatadas la polvon antaŭ si. Ili urĝas. Ankoraŭ kelkaj minutoj kaj la sonorilo eksonos...

En la fizika laborejo de Benedikta Gimnazio laboras profesoro d-ro Ányos Jedlik jam de frua krepusko. Li ricevis antaŭ kelkaj tagoj al manoj ĵurnalon "Schweiger Journal", aperitan en germana urbo Halle, en kiu li legis interesajn raportojn.

Sinjoro profesoro Jedlik laŭorde ripetas la eksperimentojn skribitajn en diversaj libroj kaj ĵurnaloj, kaj se ĝi konformas al la materio de studoj, prezentas ankaŭ antaŭ la lernantoj. Tiel la lernantoj de la Benedikta Gimnazio en Győr, – se ni permesas uzi tion elparolon –, estas malgrandaj sciencistoj de moderna fiziko. Ne unuokaze ili scias pli multan, ol la eksterlandaj sciencistoj, kiuj ofte pli malrapide informiĝas pri la eksperimentoj en la mondo, ol la junuloj en Győr, instruitaj de Jedlik.

De hieraŭ li provadas novan ilon, la multiplikatoron. (multbligilon). Ĉi tiu malgranda konstruaĵo estas drata fasko kunvolvita en ringoformo, en kies centro ŝvebas kompas. Se oni fluigas kurenton tra la drato, la magneto ekmoviĝas. Jam ĉirkaŭ kvindek foje li alkroĉis la iletan al lia glaso-baterieto, kiam la kompas unufoje transturniĝis...

Tio okazis ankoraŭ fruan vesperon, kaj ĝis la noktomezo li pruvadis, ĉu per la elano de en- kaj disŝalto de kurento estus atingebla la kontinua turnado de kompas.

Profesoro Jedlik laŭkutime legadis ankoraŭ post enlitiĝo. Sed tiunokte, tirinte sur sin la kovrilon li forblovis la kandleton. Sed la sonĝo preteriris ĝin ankoraŭ longe. En lia cerbo kuradis pensoj...

... La kompas turnadas, kaj se anstataŭ kompas li aplikus elektran magneton... kaj se la en- kaj disŝalton ne li farus per sia mano, sed mem la maŝino, tiel oni atingus eternan turnadon... poste vidis li – kiel en la sonĝo – radon, kiu estas turnata per kurento de la baterio...

Kiom li dormis tiunokte, li ne sciis. Junulo, 29-jara facile maldormas unu nokton... nun, de frua mateno li volvas la draton sur la multiplikilon kaj sur la rotoron, kiu anstataŭas la komason. La dratpaŝon volvas li sur lignotabuleton dense kaj zorge, poste kunbindas per fadeneto, ke ĝi ne disfalu, kaj fiksas ĝin sur lignotabula fundamento, poste per fingro ekturnas ĝin. La balancita rotoro turniĝas de elano, poste ŝanceliĝante malrapidiĝas kaj haltas.

... Jedlik mallevas de sur breto galvanan baterion. Elverŝas la enhavon, kaj verŝas freŝan sulfuracidon kaj akvon en la poton. Li ŝanĝas kaj la zinkan kaj la kupran platetojn (elektrodojn), poste li kontaktigas ambaŭ dratojn de freŝigita baterio al kroĉvinkto de lia ekipaĵo...

...la interna elektromagneta bastoneto de ekipaĵo ekmovas, unue malrapide, poste pli kaj pli rapide, kaj turniĝas... turniĝas rondirante, jam kviete...

Jedlik ĵetas rigardeton sur la horloĝon. La oka horo jam pasis kvin minutojn. Lia studhoru jam komenciĝis. Kion faru? Ĉu diskonektu la ekipaĵon? Ho, kiel bele ĝi turniĝas...

...Aŭ povas li lasi tiel? Li ĵetas ankoraŭ rigardeton sur la ekipaĵon kaj forlasas la

laborejon...


... En la lernoĉambro estas silento. Profesoro Jedlik kutime ne malfruas, la lernantoj antaŭ la studhoro ĉiam atendas ilian profesoron en silento. La knaboj ŝatas profesoron Jedlik. Ne nur pro tio, ĉar interesas ilin la atentokaptaj prelegoj kaj eksperimentoj de la juna pastro-profesoro, sed ankaŭ pro tio – kiel inter ili mem diras –, ĉar "li ne sidas sur pastra trono". Dimanĉe li ekskursas en ĉirkaŭaĵon de urbo, lia alta, rekta figuro ofte montriĝas en la urbo, en la librovendejoj, kaj okaze de tiuj renkontiĝoj li estas tre rekta kaj ĝentila al liaj lernantoj.

Hodiaŭ li prezentas la studmaterion nekutime monotone, haltadas ĉe la fenestro, travidadas.

Tra la fenestro de la lernoĉambro oni vidas la fenestron de la fizika laborejo. Sed li vidas nur la brilantan vitron. Kio okazas en la ĉambro? Tion ne. Ĉu ankoraŭ turniĝas la ekipaĵo?...

Plej volonte li ĉesus la studhoron, ekkuretus en la laborejon, sed la instinkta memdisciplino rehaltas lin. Kaj la horo pasas pli malrapide, ol iam...

Poste ekaŭdante la sonorileton li kunkaptas la notfoliojn kaj per viglaj paŝoj forlasas la lernoĉambro. Antaŭ la laborejo li haltas momenton, kaj subite malfermas la pordon. Li aŭdas malfortan zumadon, kiel muŝo sur fenestrovitro. La ekipaĵo ankoraŭ turniĝas... turniĝas.



4. Sokszorozó tekercsben áramváltással forgó villamdelej:  
Jedlik forgonya (1830)

Sidigas sin al tablo, kaj de tie li rigardadas la turnantan konstruaĵeton. Li malrapide skribas sur la notfolion, kuŝantan antaŭ li: "La unua elektromagneto povas turniĝi ĉirkaŭ la alia elektromagneto."

Tradukaĵo el hungara ĵurnalo